

Rakontoj de Velkinta Folio

Aoyama Tooru



Kiam mi estis studento de la Ŝtata Universitato de Jokohamo, en la universitato troviĝis esperanto-klubo. Tiutempe en la universitato estis tri famaj esperantistoj-profesoroj: Watanabe Teruiti, Kosimura Sinzaburo kaj Nagasu Kazuzi. Prof. Watanabe estis konsilanto de la klubo.

Mi ne povis aĉeti plurajn esperantajn librojn pro malriĉeco, sed la klubo posedis kelkajn librojn. Inter ili troviĝis “Rakontoj de velkinta folio” verkita de Vasilij Eroŝenko. Tiutempe en Japanio estis haveblaj ne multaj libroj alilandaj. La libron eldonis Japana Esperanta Librokooperativo en Kansajo en 1953. Subtitolo de la rakontaro estis “malgrandaj fabelaj skizoj de Ŝanhaja vivo”.

En antaŭparolo Eroŝenko skribas: En Ŝanhajo mi estis soleca. Mi havis du amikojn, sed ankaŭ ili estis solecaj. Ni sentis, ke nia feliĉa ŝipo rompiĝis, kaj ni estis ĵetitaj sur la dezertan insulon, nomatan Ŝanhajo. (Eroŝenko verkis antaŭe la rakonton, titolitan “Feliĉa ŝipo”). Unu tagon mi haltis antaŭ unu granda arbo. Sur ĝi vidiĝis nur unu velkinta folio. La velkinta folio rakontis kelkajn rakontojn.

Kaj sekvis ses rakontoj kiel jene.

La unua rakonto estas “La strata arbo”: En la strato de tiu ĉi urbo mi konas unu grandan arbon. Nun ĝi staras silente, nun ĝi diras nenion. Ĝi vidis la popolon rabitan de siaj altrangaj rabistoj kaj ankaŭ de fremdaj malaltrangaj rabistoj. La arbo silente rigardas la junulojn kiuj prenas vivkoston opion. Sed la arbo diras nenion.

La dua rakonto estas “Pri lando de revoj”: La sudaj zefiroj invitis la verdajn foliojn serĉi la landon de l’revoj, kaj la folioj demandas la bonan arbon, ĉu la spirito de niaj junaj animoj estas fidinda. Sed la arbo silentas, kaj nenion volis paroli. Kaj la verdaj folioj diras: “Ni iros nenien, nenien ni iru por serĉi la landon de l’revoj”, kaj la suda zefiro forflugis.

La tria estas “La sekreto de unu malgranda knabino”: Unu knabino venas al la arbo kaj parolas: “Mia pliaĝa frato tuŝas kun sango, la geonkloj permesas al li fari nenion, kaj mi ne povas apogi min sur liajn genuojn. Donu al mi kelke da viaj folioj por kunpleki el ili verdan kronon por li.” Sed la arbo silentis. Nur kelkaj folioj kliniĝis al la tero, kaj la knabino kun ĝojo faris kronon el ili. Ŝi haste revenis al la hejmo, sed la frato estis jam morta.

La kvara rakonto estas “La homo-ĉevalo”: Venis ĵinrikŝisto al la arbo kaj diris: “Ĝis kiam mi devas esti por ili ĉevalo? Oni elbatis la dentojn el mi kaj mi ne povas plu mordi.” Sed la arbo diris nenion. Matene policianoj trovis sub la arbo la homon mortintan kun dentoj miksitaj kun sango en la mano.

La kvina rakonto estas “Unua trezoro”: Venis al la antikva arbo unu kripla knabino kaj parolis: “Unu bela viro donis al mi monon. Kaj mi ekamis lin, sed kiam refoje mi renkontis lin, li diris: “For

monstro, diableto!” Ŝi kaŝis sian vizaĝon sur la ŝtona brusto de l’patrino-tero. Ŝi songis; en la songo ŝi estis heroino bela, kaj li, bela heroo. Neniam ŝi vekigis. La arbo silentis.

La sesa rakonto estas “La knabino kun malgrandaj piedoj”: Venis al la arbo unu knabino kun tiel malgrandaj kaj delikataj piedoj. Ŝi rakontis al la arbo: “Mi havis fianĉon de la infaneco kaj ni amis nin, sed iutage li forlasis min. Kiam mi trovis lin, li diris, ke knabino kun malgrandaj piedoj ne taŭgas por marŝi la vojon de l’vivo. Kion mi faru?” Sed la arbo silentis. La sekvantan matenon fiŝkaptistoj sur la Granda Rivero kaptis en siajn retojn la korpojn de l’bela knabino kun belaj malgrandaj piedoj.

Tia estas la enhavo de la rakontoj. Eroŝenko estis ekzilita de la japana registaro kiel danĝera persono, kaj li iris al Ŝanhajo. Li sentis tristan senton kontraŭ la kolonia urbo, Ŝanhajo, kaj ĉio pri la urbo malgajigis la koron de Eroŝenko. La urbo estis la plej granda urbo en Ĉinio, sed tie regis kolonietoj kaj granda konzerno, plie ĉiuj alilandanoj malestimis ĉinojn, kaj popoloj estis mizeraj.

Mi legis ĉi tiun libron en vintro en mia ĉambro nur kun hibaĉo kiel varmigilo. Estis malvarme. Kaj la libro temis pri malgajaj rakontoj. Do lia sento profundiĝis en mian koron.

Li donis influon al multaj famaj japanaj kulturistoj: Akita Uzyaku, Takehisa Yumezi, Masaki Hiroi, Kamitika Itiko, Ibuse Masuzi, Sasaki Takamaru, Arisima Takeo, Ogawa Mimei ktp.

Tiu “Rakontoj de velkinta folio” aperis en 1953, kaj tiamaj multaj mezgradaj esperantistoj legis tiun facile akireblan kaj allogan libron. Kaj poste aperis ankaŭ de Japana Esperanta Librokooperativo en 1956 “Turo por fali”.

Poste ni povis akiri al ni la libron “Facilaj legaĵoj --- japane, やさしいエスペラントの読み物” eldonitan de Daigaku-syorin en 1962. En la libro troviĝis “Unu paĝeto en mia lerneja vivo” dulingve: en Esperanto kaj en la japana.

En 1970 ankaŭ de Daigaku-syorin aperis “Rakontoj de Eroŝenko” (du lingva”).

S-ro Mine Yositaka redaktis verkaron de Eroŝenko en Esperanto kaj sinsekve aperigis la serion: “Lumo kaj ombro” en 1979, “La tundro ĝemas” en 1980, “Malvasta kaĝo” en 1981, “Stranga kato” en 1983, “La kruĉo da saĝeco” en 1995 kaj “Cikatro de amo” en 1996.

Tiuj estis facile akireblaj libroj de Eroŝenko verkitaj en Esperanto. Intertempe s-ro Takasugi Itiro publikis verkarojn de Eroŝenko en la japana.

Tiel mi eniris en la mondon de Eroŝenko. La verko “Rakontoj de velkinta folio” estis enirejo al alloga literaturo kaj pordo al profunda Esperantujo. Kaj mi fariĝis esperantisto.

(要約) 私は学生時代にエロシエンコの落葉物語 (Rakontoj de Velkinta Folio) を読み、感動してエロシエンコの世界に入り込み、またエスペラント文学にも親しむことになった。